

# NORDA ★ KURIERO

## Ni rendevuu en Stella ĉi-novembre!

La Nordfrancia Esperanto-Federacio kaj la Arasa klubo invitas vin al la **28<sup>a</sup> Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage**, apud Le Touquet-Paris-Plage, en la bela kaj komforta feriejo Stella-Maris (376 rue Baillarquet). Ĝi okazos **sabaton la 19<sup>an</sup> kaj dimanĉon la 20<sup>an</sup> de novembro**. Ĉi-jare organizas Roch Jullien, kiu planis tre riĉan programon!



Eklernu la lingvon aŭ la lingvoinstruadon kun Katalin Kováts; lernu per bildrakontoj kun Michel Dechy; studu Esperanto-literaturon kun Anne Jausions; iniciĝu pri jogo kun Arlette Plutniak; aŭ eĉ simple ĝuu la lokon por ripozi kaj interkoniĝi!



Kaj pinto de la aranĝo estos la **koncerto de la fama kaj ŝatata JoMo** sabaton vespere: ravos kaj dancigos vin tiu multlingva kantisto!

Informiĝu kaj aliĝu vizitante la retpaĝon de la Rendevuo: [www.arras-esperanto.fr/stella](http://www.arras-esperanto.fr/stella)

## Ĉi-dimanĉe ni dancu tutmonde en Araso!



La Arasa klubo invitas vin al dua staĝo por danci tutmonde kun Roch Jullien **dimanĉon la 16<sup>an</sup> de oktobro**. La tago estos malfermita al ĉiuj komencantoj pri danco kaj pri la lingvo. Venu ankaŭ kun viaj familianoj kaj amikoj!

La staĝo okazos en la Kultura Oficejo de Araso (61 Grand-Place) ekde la 10:00 ĝis la 17:00, kaj kostos po 7 € por ĉiu partoprenanto (tiu kotizo ne inkluzivas la tagmanĝon). Surhavu komfortajn ŝuojn kaj malstriktajn vestaĵojn.

Informiĝu kaj aliĝu per la retpaĝo de la staĝo: [www.arras-esperanto.fr/dancu](http://www.arras-esperanto.fr/dancu)

# En norda Francio rekomenciĝis la kursoj

Niaj kluboj organizas dumjarajn, ĉiusemajnajn kursojn de Esperanto, kiuj rekomenciĝis en septembro aŭ oktobro.

## Araso:

Lunde okazas kurso por komencantoj ekde la 17:30 en la Kultura Oficejo en Araso (61 Grand-Place) sub la gvido de Marianne Dunlop. Je la 18:30 samloke komenciĝas la kurso por praktikantoj ĝis la 20:00 — ĝin gvidas laŭvice pluraj klubanoj.

## Bersée:

Lunde Claude Longue-Épée instruas al progresantoj gvidante konversacian rondon.

## Lillo:

Marde Katja Boen akceptas diversnivelajn lernantojn en *Maison régionale de l'environnement et des solidarités* (MRES, 67 rue Gosselet) en Lillo de la 18:00 ĝis la 20:30. La kurso konsistas el atelieroj kun diversaj metodoj (por komencantoj, progresantoj, ktp.).

Vendrede matene Michel Dechy instruas en *Université du temps libre* en Lillo.



## Villeneuve-d'Ascq:

Marde de la 18:15 ĝis la 19:45 en la Lilla Universitato (Pont-de-Bois) okazas kurso por komencantoj kun Michel Dechy. Li planas gvidi ankaŭ kurson por progresantoj ĉiun duan lundon laŭpete.

Ni deziras al ĉiuj lernantoj sukceson kaj plezuron dum iliaj kursoj!

# Najbare kongresis Benelukso

De la 16<sup>a</sup> ĝis la 19<sup>a</sup> de septembro partoprenis ĉ. 80 homoj la Beneluksan Esperanto-Kongreson en la flandra urbo Lier apud Antverpeno. En tiu ĉarma

urbo ili ĝuis prelegojn, klasikmuzikan kaj regean koncertojn, kaj plurajn biciklajn aranĝojn en amikeca etoso kaj sub bela suno.



## KOLOFONO

La *Norda Kuriero* estas la informilo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio.

Redaktis: Katja Boen, Xavier Dewidehem.  
Enpaĝigis: Xavier Dewidehem.

Ni invitas la federacianojn kaj la klubestrojn sendi informojn al la *Norda Kuriero* per la jena adreso: [kuriero@esperanto-nord.org](mailto:kuriero@esperanto-nord.org)